# HEJS JUNECO

**HISPANA ESPERANTISTA JUNULARA SOCIETO**

*ATOCHA, 98-4.º - TEL. (91) 230 87 98*
*28012 MADRID*

N-ro 123
Jan-'85



# 1985: internacia junulara jaro

# HEJS-JUNECO.

ELDONAS, H.E.J.S. , Atocha 98-4º, 28012 MADRID

REDAKCIO, Sol, 83 - 85, 41003 SEVILLA

Redaktoroj, **ALBERTO FRANCO RAMIREZ**
**FRANCISCO JAVIER MOLEON**

Kunlaboras, ANDRES MARTIN GONZALEZ
LUIS SERRANO PEREZ
ESTRARO DE HEJS.
HEJSĉjo.
Kara Majstro



Ⓚ, publikaĵesperantaj junularaj hispanaj, 1985


## N-ro 123 Januaro -1985

**Enhavo**


1.............................Internacia junulara jaro.
2.............................Tio, kion vi vidas.
3.............................Unua artikolo.
4.............................Ĉefartikolo.
5.............................Psikologio.
7.............................HEJS-ĉjo intervjuas.
8.............................Centraj paĝoj.
10............................Konkurso.
11............................Kara redaktoro.
12............................Aliĝilo por aliĝi.
13............................Letero al mia amatino.
15............................41-a I.J.K.
16............................Malago atendas vin.


Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoro mem. La redaktistaro pretas lingve korekti ĉiujn kunlaboraĵojn prozajn, sed ne la versajn por ne ŝanĝi la originalajn rimon kaj ritmon.




Denove HEJS-Juneco atingas viajn ansiemajn manojn. Ne plu klopodu, bonvole! Kion oni deziras pasie, oni ricevas plenĝoje. La revuo restas same kiel antaŭe: vi trovos la samajn stultajn artikolojn, la samajn stultajn desegnaĵojn, la samajn stultajn informojn, sed, atentu, ne la samajn stultajn redaktorojn (almenaŭ duone). Tio estas grava afero. De Madrido la revuo forflugis al sudo, ie ĉi tie, sed ne per flugiloj de facila vento, sed de komplikaj. Hispanio estas tre vasta (ne hasta), oĉjoj! Tion jam diris Zamenhof, sed li ne povis diri "oĉjoj", ĉar li ne legis HEJS-Junecon. Se vi deziras, ĉi revuo povas esti de nun pli malserioza ol antaŭe, malfacila tasko, sed ni preferas ĝin pli serioza (serĉu "serioza" en PIV). Aliflanke, seriozeco ne sidas (aŭ kuŝas) sur malŝerco. Ŝerco estas alia formo de seriozeco, kiun ni proponas al vi de ĉi paĝoj. Ĉu vi komprenis ion? Se jes, vi komprenis pli ol ni. Tiel haosa, kiel ĉi tiu artikolo estas la aktuala situacio de HEJS. Kiam kace ni povos konvinki niajn fantomojn (pardonu, niajn membrojn), ke HEJS bezonas nun ĉies helpon por ne malaperi? Kaj tio ja ne estas ŝerco. Ne restu kviete, kvazaŭ la situacio ne influus vin. Ni ne estas pesimismaj sed realismaj. Laboru pli intense, aŭ se vi ĝis nun ne laboris, eklaboru! Ekzemple, kion vi unue povas fari, estas kontribui per via ĉeesto en la venonta HEJS-renkontiĝo de Malago, pri kiu troviĝas informoj kaj aliĝiloj ĉi-ene. Ni komencis la artikolon per rido kaj finis ĝin per malrido. Helpu nin, por ke venontnumere ĉi artikolon regu **ĝisfina ridego.**

# Ĉefartikolo

MIGUEL ANGEL SANCHO PARDO, Prezidanto de HEJS.

Estimataj samasocianoj:

Kiel prezidanto de HEJS mi deziras uzi ĉi tiun paĝon, alvoki vin ĉiujn. Mi scias, ke alvoko neniam taŭgas por io, sed mi ne volas rezigni eĉ la lastan eblon.

Kiam mi posteniĝis en la Asocio, tiu rapide vigliĝis, kaj eĉ atingis internan strukturon. Tri jarojn poste ĝi preskaŭ falas en dormon. Tian dekadencon kaŭzis ĉies laco, pro la eksterasociaj baroj, tedo kaj seniluziiĝo.

Ni ne atingis spektaklajn rezultojn, kaj perdis nian paciencon. Ĉar junuloj, kelkaj el ni eniris etapon, kiam okupiĝo pri io alia ol la propra futuro estas danĝera. Tial multaj antaŭenpaŝintaj la Asocion ne plu povas samintense daŭrigi.

Jen do la problemo analizita. Kion fari por la bonfarto de HEJS?. Necesas simple anstataŭantoj!

La tuta movadeto hispana estas en krizo, kiu daŭras jam sufiĉe. Neniu deziras atenti ĉi tiun fakton ĝis nun, kiam efektive oni atingis pinton en ĝi. HEJS estas unu el la malmultaj esperoj, ĉar produktejo de kompetentaj esperantistoj, nelude seriozaj, malportantaj spiritaĉajn ideojn. Ni ne rajtas neglekti la eviton de malapero!


Homoj kiel mi estas devigataj pro la vivo mem (fino de kariero, militservado, atingo de laborposteno...) retiriĝi iome el la aktiva agado. Ĉu aliaj ne prenu la torĉon? Ĉu ni malprofitu tiom da penado? Endas pripensi ĉion ĉi.

En la limoj de mia eblo mi daŭrigos, responde al pluraj apogvokoj laste ricevitaj. Tio tamen ne estas solvo.

Mi petas vian reflektiĝon. Engaĝiĝuloj bezonataj!

SOS!!!

# Psikologio



De antaŭ longe oni aŭdas senĉese
paroli pri Psikologio, kaj la ple-
jmulto el la personoj rigardas ĉi
sciencon kvazaŭ sorĉan rimedon por solvi
la spiritajn problemojn. Mi, kvankam ne
konsentas tute tian sintenon –ĉar same ki
el okazas rilate medicinan kaj aliajn karierojn, la popolo a
agadas kiel ŝafaro sorĉigita de mona miraĝo aŭ/kaj de socia
prestiĝo–, tamen ŝatas Psikologion, kompreneble ne pelite de
propragando pli-malpli klera, sed de la intima konvinko rila-
te la povon de ĉi tiu scienco por solvi la mensajn, persone
jn kaj kondutajn problemojn de l'homo.

Oni povas paroli pri la objekto de la komunikado sed, in
ter homoj, ekzistas alia dimensio, t.e. la kielo. Kaj ĉi las-
ta havas plian gravecon kiam ni celas koni la aliulojn. La ki
omo kaj la kielo estas du faktoroj tre konsiderindaj kiam ni
cerbumas pri la homaj agadoj. La intelekta kvociento, la per-
soneco, la konduto, la adapteco al medio, ĉio kion oni povas
pripensi rilate konkretan homon ŝatendas kvante kaj kiele. Ti
o tamen estas iuj el la aspektoj ofte forgesitaj kiam, aplik-
ante testojn, oni intencas koni la karakteron de la aliuloj.
Foje okazas, ke jen pro la enhavo, jen pro lokaj aŭ personaj
cirkonstancoj de la provo, la rezultatoj estas tute malfidin-
daj. La aplikado de samaj aŭ similaj testoj, la trejnado de
personoj atingita per la ripeto de tiaj ekzercoj, la sinteno
de la fakulo kiu kontrolas la agadon kaj multaj aliaj pli-mal
pli sutilaj sed ne forgesendaj flankfaktoj tre ofte ŝanĝas la
konkludojn. Kompreneble, kapabla psikologo atentas ankaŭ la fa
milian, amikan, najbaran, profesoran,ktp. intervjuojn kaj hel
pe de ĉiuj donitaĵoj trovitaj opinias pri la persono.

Memvideble, mi ne estas parolanta al profesiuloj sed al
la ceteraj. Krome, mi neniel celas malpliigi la gravecon de la
provoj. Mia klopodo estas klarigi iomete ĝiajn limigojn; neni-

am forgesu, ke troigi estas malbone, kaj ke troigo okazas ĉiam antaŭ ol io populariĝas, ĉar kutime la popolo ne atentas la nuancojn kaj ŝatas nur facilajn rimedojn. Pro tio, kvankam la mesaĝo multfoje povas alveni al li honeste kaj sincere, ĉi tiu tamen ricevas ĝin laŭ sia propra kapableco, kaj deziroj kaj, volonte aŭ ne volonte, ĝin miskomprenas.

Sed ni lasu ĉi enuigan kaj simplan aferon, ĉar tiel la homo kiel la Historio de Psikologio, konsistigas studobjektojn indajn je serioza, atenta kaj kompleza pripenso.

Pro tio, ke estas tute maleble elĉerpi kiun ajn psikologian temon, pri kiu oni povas paroli per mallonga artikolo, mi en la sinsekvaj kunlaboraĵoj, iom post iom, klarigos nur la plej gravajn kontribuaĵojn liveritajn de iuj elstaraj fakuloj, kiuj ja rimarkigis pri la ĉefaj linioj de ĉi tiu scienco. Per tio mi intencas nur atentigi pri la graveco de iuj aspektoj kaj tiamaniere havigi al aliuloj la eblecon profundigi en la temojn post koni ĝiajn elementajn principojn. Ĉiicele mi opinias, ke estas pli konvene havi klarajn, kvankam malmultajn, ideojn anstataŭ multajn sed konfuzajn. Komprenèble, preferinde estas ĝui la posedon de multaj kaj klaraj, tamen, ĉar la homo estas limigita estaĵo kaj neniu estas kompetentulo samtempe pri pluraj sciencobjektoj, necesas konscii pri nia mensa kapablo kaj konsenti tute kun la franca pedagogo Montaigne kiam jesas, ke preferinde estas havi kapon bone "faritan" ol tre plenan.


ANDRÉS MARTÍN GONZÁLEZ

---

Informoj en paĝo 15a.

41a I.J.K.






HEJSĉjo: Kara Ludoviĉjo, kial vi ne kreis ideon eksternan, vi c'al interna.

Ludoviĉjo: Ĉar ideo eksterna povus esti tre klara, sed interna, pro sia interneco, estas tre konfuza kaj obskura. Se vi povus scii kiom multe mi amuziĝas el mia tombo...

HEJSĉjo: Mi ĉiam havis dubon, kiun vi nun povas klarigi al mi. Ĉu en esperanto ĉiu prepozicio havas unusolan signifon?

Ludoviĉjo: Kompreneble ke jes! Ĉu vi prenas min por stultulo[z]? Ĉu vi pensas min malsana de la kapo[z]?

HEJSĉjo: Pardonu min, kara Ludoviĉjo! Eble mi estis tre petola. Kion vi pensas pri neologismoj?

Ludoviĉjo: Oni devas introduzi kiel eble plej poke da ili.(da ili[z]).

HEJSĉjo: Kaj kio pri interpunkcio?

Ludoviĉjo: Ĉiu uzu, la interpunkcion laŭ, sia propra.nacia lingvo![z]

HEJSĉjo: kaj fine, kion vi povas diri pri la hispanaj esperantistoj?

Ludoviĉjo: Mi estas fiera kiel hispano[z]. Mi ĵuras per la andaluziaj floroj granataj kaj per ambaŭ kastilioj, ke mi vojaĝis en Hispanujo(n)[z].




La esperantistoj, homoj kiuj parolas esperanton, ne povas vivi aparte de la evoluo, kiun spertas la mondo, kaj precipe de ĉiuj kampoj, en kiujn oni povas enkonduki Esperanton. Se paroli por ekzemplo pri komputiko, estas konstatende, ke Esperanto povas akiri grandan profiton de Komputiko kaj Komputiko povas akiri grandan profiton de Esperanto. Esperanto estas lingvo, kaj ĉi-sence en niaj programoj ni povas uzi ĝin kiel laboran lingvon. Paralele Komputiko povas ovri al Esperanto novajn horizontojn, kiujn multaj nekonantoj de tiu ĉi scienco eĉ ne povas imagi (aŭ ignoras). Ekzemple Komputiko povus taŭgi por lernigi nian lingvon. Pro la morfologia strukturo de nia lingvo, ĝi estas la plej trafa lingvo, kiun oni povas klarigi per Komputiko. Sed, kial ni ne diskutu ĉion ĉi en Seminario pri Komputiko? Nu, kie? Ekzemple en la 3a Andaluzia Kongreso de Esperanto, kiu temos same kiel ĉi artikolo. Tiu kongreso ne volas esti profesiega nek amatoreta. Nun pli-malpli oni kalkulas je la helpo de personoj, kiuj povas multe diri pri tiaj temoj pro sperto, dediĉiĝo,ktp. Oni ne volas aranĝi grandiozan entreprenon. Oni tamen agos serioze kaj laŭkapable. Via ĉeesto do estas nepra (vi povas peti aliĝilojn kaj informojn de ĉi redakcio). Je pli alta nivelo ankaŭ somere okazos en Hungario "Interkibernetik-85", internacia kongreso pri Komputado, en kiu funkcios tri laborlingvoj, nome la angla, la franca kaj esperanta. Rimarkeble estas, ke niaj hungaraj samideanoj estas delonge en la unuaj lokoj rilate tiun sciencon, kaj ili jam pruvis, ke oni povas labori kune per Esperanto kaj Komputiko. Sed por kompreni kion ni volas diri, oni devas kompreni pli frue, ke E-o estas nur lingvo. Se vi atingas apartigi de via esperantista menso ĉiujn aliajn parazitajn pensojn aŭ ideojn, jen internajn, jen ekster-

najn, vi estos libera. *H-J.*

---

# Atentu Legantoj!!!

NUN VI ESTAS LEGANTO. SED SE VI VOLAS, TUJE VI POVAS IĜI VERKANTO. LA PORDOJ DE NIA REDAKCIO ESTAS TUTE MALFERMAJ POR VIAJ KUNLABORAĴOJ. EKZEMPLE NI PROPONAS AL VI JENAJN TEMOJN POR VERKI ARTIKOLOJN PRI ILI POR LA VENONTA REVUO:

- Kio pri la Internacia junulara jaro? Dum oni parolas registarnivele pri la Internacia Jaro de la Junularo, ekzemple la Unuversitato fariĝas vera produktejo de konfliktoj, kaj en Sevilo la polico ŝarĝas kontraŭ junaj manifestaciantoj. Ĉu denove alia fikcia "Internacia jaro"? Verku tiurilate.
- English yes, Esperanto jes. Ĉu interkonsento inter ambaŭ lingvoj? KIAL UNU RIFUZU LA ALIAN? Opiniu.
- Komentu interesajn filmojn, kiujn vi spektis. Kio pri la filmo 1.984?

## KAJ...

Ne forgesu pagi vian kotizon al HEJS, ne forgesu aliĝi al la 9-a HEJS renkontiĝo, ne forgesu pagi vian kotizon al TEJO, ne forgesu aliĝi al Eringerfeld, al la 3a Andaluzia Kongreso de Esperanto. Ha! Ne forgesu: Artaj kaj Sciencaj Horoj en Kartageno dum la 45a H.K. de E-o; aliĝu almenaŭ pro tio.

---



NOVA TEJO-TUTMONDE (TT!). Redaktoro:
Andy E. Künzli
Zumhofstrasse, 22
CH-6010 KRIENS LU
SVISLANDO

# Nova Konkurso

## Atentu !!!

**KONKURSO PRI SPRITAJ DESEGNAĴOJ KUN TEKSTO EN ESPERANTO**

-Sendu ne pli ol du desegnaĵojn subskribitajn aŭ per vera nomo, aŭ per pseŭdonimo (en la dua kazo sendu al ni aparte vian veran nomon,kiun ni neniel publikigos se la aŭtoro ne deziras tion).

-Oni premios la tri pli bonajn, kaj iliaj aŭtoroj ricevos esperantaĵojn(librojn, broŝurojn,ktp.) kiel memordonacon.

-Eblas deklari la premion dezerta, se ne ekzistas sufiĉa kvalito.

- Iom post iom oni publikigos ĉi-revue la plejmulton el la desegnaĵoj senditaj, pro tio ni petas de la aŭtoroj, ke ili desegnu per nigra aŭ ruĝa inko kaj tre klare.

-La prezidanto de HEJS kaj ambaŭ ĉi-revuaj redaktoroj konsistigos la juĝantaron.

-Limdato de ricevo estos la 1-a de aŭgusto, 1985. La rezulto aperos en la lasta revuo de la jaro 1985.

---

**Sendu artikolojn por la sekcio CIGNO IKSO 1 Scienco, spaco, Nifo-j, ktp.**

---

Ĉion koncerne al la revuo k/aŭ al la konkurso adresu al:

HEJS-JUNECO
Sol, 83 - 85
41003 SEVILLA
Hispanio

# KARA REDAKTORO

En ĉi sekcio ni volas publikigi ne longajn komentojn, rimarkojn, sugestojn de niaj legantoj, komprenenble kun la celo plibonigi nian revuon. Ni akceptos ĉiajn kritikojn, kiuj ĉiam kunlaboras al vigla konstruado de ajna publikaĵo. Bonvolu subskribi ĉiam viajn komunikaĵojn. H-J

Estimata redaktoro:

EsperEble HEJS-Juneco estos plue la plej ĝuste verkita revuo esperanta en Hispanio.

Ĝorĝo Kahmasczcklow.

Estimata amiko,

Verŝajne ĝi estos plue ne la plej ĝuste verkita revuo esperanta en Hispanio, sed en la tuta Eŭropo kaj parto de la okcidenta mondo.

H-J

Estimataj,

Kial vi ne publikigas en via revuo la vivon kaj aventurojn de la Andaluzidoj.

Andaluzido.

Estimata,

Ni ne faris tion, ĉar interalie ĝia aŭtoro deklaris, ke lia verko estas fekaĵo. Sed eble alia prenos tiun taskon kaj reellaboros la originalan manuskripton.

H-J

ĈI TIU ESTAS LA 11-a PAĜO!!!

# HISPANA ESPERANTISTA JUNULARA SOCIETO

C/. ATOCHA 98 - 4.°
TELF. 230 87 96
MADRID - 12
HISPANIO

HEJS ESTAS LA JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO KAJ LANDA SEKCIO DE TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO. ĈIUJ FEDERACIANOJ MALPLI AĜAJ OL 26 JAROJ RAJTAS AŬTOMATE MEMBRIĜI AL HEJS. ĈIUJ ALIAJ ESPERANTISTOJ POVAS HELPI HEJS PER SIMBOLA ALIĜO (PROTEKTANTOJ). SE VIA AĜO NE PRETERIS LA MENCIITAN LIMON, KAJ VI DEZIRAS ALIĜI AL HEF-HEJS, NI PRETAS PERI VIAN ANIĜON. PLENUMU LA ALIĜILON KAJ SENDU ĜIN AKOMPANE DE POŜTMANDATO AL LA SUPRA ADRESO. ĈIUJ MEMBROJ DE HEF-HEJS RICEVAS "BOLETIN", "HEJS-JUNECO", "KONCIZE", LA KONCERNAJN ADRESAROJN, FACILIGOJN JE KONGRESOJ KAJ TENDAROJ, KAJ ĈIUJN RAJTOJN KONSIDERITAJN EN LA STATUTOJ DE AMBAŬ ASOCIOJ. PROTEKTANTOJ RICEVAS LA SAMON KROM BOLETIN.

**ALIĜILO**

Individuaj Membroj ............ 750 ptj
Protektantoj .................. 500 ptj

Tuta Nomo:

Adreso:

Urbo: Poŝtkodo aŭ distrikto:

Provinco: Aĝo:

Subskribo

Karulino, mi ne kapablas skribi. Mia skribilo ne scias surpaperigi miajn pensojn, eĉ mia mano estas mallerta, maldiligenta, kvazaŭ paralizita. Male, en mia cerbo bolas, amasiĝas ideoj, pensoj, deziroj, suferoj, ĝuoj, ĝojoj, trankvileco kaj maltrankvileco, ĉiuj ĉi tiuj elementoj de la homa valoro miksiĝas, batalas inter si; ĉiu pravas kaj neniu deziras toleri la alian. Ho ve! Kiom granda estas la amo!! Ordigi ilin, uzi kaj utiligi ilin estas mia tasko, mia celo, mia deziro,mia vivo. Kia turmentado, amatino mia! Kiam iom post iom mi kapablas meti ĉiun parton de mia suferado kaj ĝojado en la ĝustan lokon, apenas vi. Mia penso, mia imagokapablo vidas vin, kaj ĉio devas rekomenciĝi; via figuro kaj mia senbremsa impulso ami vin super kiu ajn baro, nuligas tiun ordigadon de miaj pensoj kaj deziroj, ordigado tute necesa, ĉar alimaniere mia amo kaj mi, via amanto, freneziĝus pro feliĉo ne ĝuata. Mi pensis en tiu malnova sistemo, la amado per la skribado de miaj inklinoj por vi, sed la granda konfuzo, feliĉa konfuzo ekzistanta en mia menso, eĉ tion ne permesas al mi. Karulino, ne estas konfuzo pri mia amo, feliĉe ne estas konfuzo pri tio. Mia amo por vi vi aperas hela, sennuba, sincera, kora, freŝa, kiel maja mateno en kiu iomete pluvis. Ne karulino, tiu konfuzo estas motivita de mia senmezura amo al vi, ĉiujn sentojn, kiuj estigas mian amon, mi deziras eksponi, sed mi ne povas, tio jam estas mia premio kaj mia fiasko, mia venko kaj mia malvenko, ĉar ĉu povas ekzisti amo pli supera ol tiu, kiu sin metas super ĉio ekzistanta, ĉu materia, ĉu psike, ĉu spirite en mia vivo? Fakte ne. Sed kiam miaj brakoj etendiĝas atendante kunpremi vin al mia korpo, kiel provo de mia nemezurebla amo, alia penso avertas min: ne makulu vian altspiritan valoran amadon per tiuj plezuraj momentoj. Miaj okuloj deziras vidi vin, mi deziras ĝui vian personan ĉeeston, ĉu tio ĉi ne estas normalaĵo en la vivo de ĉiu amanto? Sed jen alia penso, kiu konsilas kaj retenas min: estu prudenta, viaj okuloj povos vin trompi. Sed ĉu miaj okuloj povos min trompi? Kaj en ĉi tiuj duboj mi vivas, karulino mia. Ne, tute ne. Ili ne malgrandigas mian amon, amatino



mia. Ĉu la amo povas kreski? Ĉu la amo povas pliboniĝi ĉiutage, ĉiumomente? Eĉ tiuj pensoj turmentigas min, ĉar se morgaŭ vi estos pli amata ol hieraŭ, tio signifas, ke la antaŭan tagon mi ne amis vin sufiĉe. Mi ribeliĝas kontraŭ tiu regulo. Mi ĉiam amas vin tiomgrade, kiom kiam la akvo elbordiĝas de la glaso. Mia amo statas ĉiam alte , en la pinto, senmezure kaj komplete persista. Mia karulino, ĉu la amo baziĝas sur tiuj duboj? Ĉu de tiu stadio burĝonas la vera floro de la amo? Ne estas facile ami, sed estas neeble vivi sen amado. Mia karulino, mia amatino, mi deziras senti la batadon de via koro. Mia amo al vi tremigas mian korpon, kaj mi fariĝas lulilo de tiu grandioza amo, kiun vi estigas al mi. Vi estas mia vivo. Nenio estas krom vi. Vi estas mia mondo, mia universo. Kiom bele estas profunde ami!!

Vivi ĉiumomente por vi. Kia amo! Kia suferado! Kia feliĉo! Miaj pensoj flugas al vi, ĉar ili ĉiam estas kun vi, por vi; ne ekzistas distancoj. La malproksimeco malaperas, kiam la amo regas la vivon. Ni estas kune, ĉiam kune, ĉar ĉu ni povos vivi alimaniere? Ankaŭ la tempo ne ekzistas, ne estas la hieraŭ , nek la hodiaŭo, nek la morgaŭo, estas daŭra momento, estas la momento de nia eterna amo, ne estas horoj, la horoj por ni estas nia eterna amo, la tempo ne flugas, ĉar nia tempo estas nia amo kaj la nia ne konas limojn, nek mezurojn, ĝi estas kompleta, senfina.

Mia amatino, jen mia ĉiopova amo. Estas nenia forto materia aŭ psika, kiu haltigos mian amon. Mia vivo estas vi, mia destino estas vi, mi enspiras kaj elspiras por vi; krom vi nenio en la vivo havas celon por mi. Mia vojo estas vi, mia lumo, mia diino, mia regantino. Mia vivo estas vin amadi. Aparte de vi, la vivo konsistas nur el senvalorajoj. Vi estas kiu donas al mi vivindan celon. Via estas mia spegulo, mia gvidanta stelo. Ne estas adiaŭo, ĉar ni ne povas adiaŭi nian amon, ĉi tiu letero estas unu el la elementoj de la senfina ĉeno, kiu konsistigas nian amon. Amatino, la vivo sen vi ne ekzistas.

Ĝis la morto, via.

LUIS SERRANO PÉREZ

# 41-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO
## SCHLOSS ERINGERFELD
## 22-29.7.1985 F.R. GERMANIO

Programo:
1985 estas proklamita kiel Internacia Junulara Jaro (IJJ). Ankaŭ dum nia IJK ni diskutu la specifajn problemojn de la junularo en la moderna industria socio. Se ĉiuj detaloj kaj problemetoj estas regulitaj per leĝoj kaj preskriboj, se dum ĉiu sekundo la amaskomunikiloj turmentas vin per informoj kaj vespere per konsumenda distro el la televido, se la sociaj normoj kaj moralo direktas vin plene adaptiĝi al tiu sistemo, kie restas via individueco, via kreiveco, viaj propraj ideoj? Kial tiom multaj junuloj en la materie riĉaj landoj neniel emas integriĝi en la gepatran generacion - la sistemon de konstanta konkurenco? Kial tiom multaj junuloj fariĝas pli kaj pli agresemaj? Kiujn celojn havas la hodiaŭa junularo? Jen demandoj traktotaj en la pritemaj laborgrupoj, diskutoj kaj prelegoj.

La bela naturo ĉirkaŭ Eringerfeld invitas vin promeni kaj ripozi en la arbaro. Sed vi ankaŭ povos multe aktive sporti dum la IJK. En nia sporta laborgrupo ne dominos konkursoj kaj ludoj unu kontraŭ la alia, sed ludoj sen gajnantoj (kaj malgajnantoj). Kulmino de tiu laborgrupo estos granda sport- kaj ludfesto kun nekutimaj sportiloj kaj aktivecoj. Samtage okazos granda komuna migrado tra la arbaro kun pikniko.


Kompreneble ne mankos tradiciaj programeroj kiel interkona, teatra, internacia kaj adiaŭa vesperoj. Specialaĵoj estos rokkoncerto de la Berlina grupo "La Mondanoj", ekskurso al cementfabriko, kaj certe aldoniĝos multe. Ni intence ne organizas trdiciforman "tuttagan ekskurson", dum kiu busoj portas la homojn de unu turismaĵo al alia.

Kaj post la IJK:
Tuj post la IJK estos 6 tagoj da libera tempo ĝis la komenciĝo de la UK en Augsburg. Ni organizos grandan biciklan karavanon de Eringerfeld al Augsburg, tra tre belaj partoj de F.R.Germanio. Se vi ne emas tiom sporti, ripozu dum tiuj 6 tagoj en nia postkongreso ĉe sudgermana grupo.


Kotizoj:
Zorga buĝetado kaj iom da ŝtata subvencio ebligis al ni oferti al vi kotiztabelon kun nekutime malaltaj prezoj. Precipe sub-26-jaruloj pagas mezume trionon malpli ol en la antaŭaj jaroj:

| DM | aliĝo ĝis | | | |
|---|---|---|---|---|
| aĝo | 85 jan 15 | 85 maj 01 | 85 jul 01 | surloke |
| ĝis 21 | 150 | 170 | 190 | 210 |
| ĝis 25 | 170 | 190 | 210 | 230 |
| ĝis 35 | 250 | 270 | 290 | 310 |
| pli | 310 | 330 | 350 | 370 |

LKK. Postfach 101422 D-2000 HAMBURG-1




41. IJK





La kastelfantomo ateadas viajn monerojn!



MALAGO Andaluzio

Atendas vin en la

IX-a HEJS - RenKontiĝo.

Kompletigu tuj l'aliĝilon, kaj sendu ĝin al L.K.K. sur strato
Trinidad Grund, 28, 2º dcha.
29001 - MÁLAGA.